N-ro 177 printempo 2024 ISSN-1565 3315

# ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו



VARSOVIO, JUDA TOMBEJO
TOMBO DE E.L.ZAMENHOF

LA 14.04.1917
NIA MAJSTRO FORLASIS NIN

# ISRAELA ESPERANTISTO № 177 2024

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)



*La redaktoro*
*Mikaelo Lineckij*
mikaelo@esperanto.org.il

*La redakta komisiono:*
*Gabi Zeevi*
*Amri Wandel*
*Jehoŝua Tilleman*

*ELI-Prezidanto*
*Jehoŝua Tilleman*

*Poŝta adreso de ELI:* P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Aviv, Israelo.


**MEMORIGO.**
Pri ĉiuj subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Pri ĉiuj ne subskribitaj materialoj respondecas la redaktoro.




***Enpaĝigo:***
*Mikaelo Lineckij*
***Retejo:***
***http://esperanto.org.il/ie.html***
***Abontarifo eksterlanda:***
20 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.


***RIPETO***. Eblas ricevi la revuon al sendita de vi elektronika poŝtadreso.

**Enhavo**


"Luminesk" - *Amri Wandel* ........ 3
Ekskurseto en la historion de Israelo ........ 5
Ĝenerala Konferenco de UNESKO - *François Lo Jacomo* ........ 6
Israela gimnasto Artem Dolgopjat ........ 7
Israelo - Gaza - *Ŝ.Lerman, Gabi Zeevi* ........ 8
Parolado de M.Novak ........ 11
Eksterteranoj estas ĉi tie - *Gabi Zeevi* ........ 15
Mi kredas je la Bono. - *Claude Piron* ........ 18
Gimnastiko por cerbo. Parabolo ........ 20
Judino - *traduko de M.Bronŝtejn* ........ 21
Pripensu ........ 23
Lingva helpo ........ 24
Ŝimon Peres ........ 25
Kvin judaj saĝuloj ........ 27
LitSupO: Tro moderna fabelo ........ 28
Saĝeco de patro ........ 30
Diraĵo de M.Ĵvaneckij ........ 30
Juda prozo de vivo ........ 30
Ni provu iom cerbumi, ĉu? ........ 31
Adiaŭaj ridetoj ........ 32

## SURINSULA NOVJARA KUNVENO EN GERMANIO

**Aperis en Revuo Esperanto 2024, februara numero**

**Amri WANDEL**


La komuna foto

Jam la naŭan fojon Germana Esperanto-Asocio okazigas la novjaran kunvenon *Luminesk'*, kiu provas konservi la etoson de la iama populara *Internacia Festivalo*, pli ol 30 jarojn organizita de Hans Dieter Platz (HDP). La ĉi-jara situo tamen estis unika: sur insulo Norderney, unu el la orient-frisaj insuloj en la Norda Maro. Jam la alveno estis promesplena: ĉ. 15 el la partoprenantoj renkontiĝis en la sama pramŝipo, kaj gaje kune pasigis la unuhoran ŝipadon. Efektive pluraj planis preni la plifruan pramon, kiu pro la trajdaj cirkonstancoj estis nuligita. Sekve la tuta grupeto alvenis malfrue post la oficiala vespermanĝa horo, sed tamen neniu restis malsata, ĉar informita pri la malfruo, la domo servis vespermanĝon speciale por la alvenintoj per tiu pramo. Poste oni prezentis la planitan programon, kiu estis ne nur riĉa kaj varia, sed ankaŭ sen paralelaj eroj, tiel ke eblis spekti ĉiujn programerojn. Aldone al la prelegoj kaj ekskursoj okazis danc-lecionoj kaj manlaboro gviditaj per Nicky Jenssen, kaj paroliga kurso de Kristin Tytgat.

En la morgaŭa tago okazis gvidita esplorado de la urbeto. Ni konatiĝis kun la surprise luksa kinejo en la historia konvesacia halo, kun la preĝejo, kaj multaj rakontoj pri la malgranda komunumo. Sekvis kantiga ateliero de Kajto. Poste okazis lumbilda prelego de Karl Breuninger pri la germanaj setlantoj en Kartvelio. En la vespero okazis interesa vizito al la observatorio – amatora astronomia grupo kiu memstare konstruis imponan observatorion. La direktoro de la grupo prezentis la historiajn kaj belajn fotojn, kiel la Lakta Vojo kun la insula lumturo kaj aŭroro, fotitaj sur la insulaj plaĝoj. Bedaŭrinde verajn stelojn ne eblis vidi, ĉar la ĉielo restis nubkovrita ankaŭ dum la postaj tagoj, kiuj foje estis eĉ pluvaj. Vendrede ni aŭskultis prelegojn pri la judaj germa-

nlingvaj poetoj dum la nazia regno, de Christanne Oetter, kaj *Astrofiziko por Laikoj* (kun AIS-ekzameno) de Amri Wandel. Ambaŭ prelegoj okazis kadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU), kiu festis sian 15-an jaron. Posttagmeze okazis vizito al la Unesko-centro *Vadomaro,* kie ni lernis pri la naturo de la insulo. Vespere Ulrich Brandenburg rakontis pri la transsiberia E-karavano al la UK en Koreio. Sabatmatene okazis prelego de A. Wandel *Asteroidoj, Kometoj kaj Meteoritoj* (kadre de IVU). Pri trafikcirkloj rakontis Daniel Muehlemann. Posttagmeze okazis vizito al la domo de loka folkloro kaj orientfrisa teotrinkado, kiu ĉarme prezentis diversajn lokajn tradiciojn, sekvita per la banmuzeo pri la evoluo de la insulo kiel populara banloko dum la deknaŭa kaj dudeka jarcentoj. Apartan atenton la preleganto dediĉis al la malluma periodo de la nazia regno, kiam la banado de judoj en la insulo estis malpermesita. En la vespero okazis kunveno pri Afriko kaj la UK en Tanzanio. Komence salutis Amri Wandel, vicprezidanto de UEA, kaj invitis aliĝi al la UK. Sekve Costa Masavi, prezidanto de la LKK prezentis per Zoom la kongreslandon, kaj informis pri flugoj al Aruŝa, loĝado kaj ekskursoj. Pluraj el la aŭskultantoj plendis ke daŭre mankas informoj pri la UK, kaj pledis por baldaŭa publikigo de la Dua Bulteno. En la lasta tago de la jaro okazis prelegoj pri la *plat-germana* de Franz Kruse (ankaŭ ĉi kadre de IVU), *Knedoj kaj pasto-poŝoj* (Wera Blanke) kaj *Sunhorloĝoj* (kadre de IVU, kun ekzameno, de Christof Roether). La vespera programo komenciĝis



per "Orient-frisa abitur-ekzameno" prezentita de Barbara Brandenburg, kiu malgraŭ ĝia nomo konsistis ĉefe el logiko-demandoj, sed necesis plenumi antaŭajn praktikajn taskojn kiel senŝeligo de salikokoj, orientfrisa teceremonio, kurso pri la plat-germana, gustumado de frisa vino per kuleroj ktp. Sekvis novjara koncerto de Kajto kaj silvestra balo. La unuan de januaro okazis la tradicia novjara promenado, parte sub

pluvo, laŭlonge de la plaĝa promenejo. Reveninte eblis aŭskulti prelegon de Guido Brandenburg *Ŝipoj kaj trajnoj,* kaj sekve prelegon de Nane pri la najbara nederlanda Frislando. Dum la adiaŭa vespero oni disdonis atestilojn: unue por la orientfrisa abitur-ekzameno, kaj sekve por la tri IVU-prelegoj en kiuj okazis ekzamenoj: *Astrofiziko por Laikoj* (12 ekzamenitoj), *Asteroidoj, kometoj kaj meteoritoj* (9) kaj *Sunhorloĝoj* (6). Post la resumaj vortoj de la organizantoj kaj adiaŭa kanto de Kajto oni ankoraŭ longe sidis kaj babilis en la gufujo (vintra ĝardeno), kvazaŭ rifuzante forlasi la agrablan etoson. En la sekva mateno ĉiuj devis jam adiaŭi la insulon Norderney, prenante la pramon reen al la kontinento.

## EKSKURSETO EN HISTORION DE ISRAELO

Laŭ la propagandaj sloganoj de diversaj reĝimoj kaj grupoj, kontraŭantoj Israelon, cionismon kaj judojn, Israelo ne havas la rajton ekzisti, ĉar ĝi ŝtelis la landon de araboj. Tiu kaj similaj asertoj kontraŭas la historiajn faktojn. La lando estis dividita inter judoj kaj araboj laŭ la UN-decido de 1947. La arabaj loĝantoj malakceptis tiun decidon, kaj la pli ekstremaj provis forigi la judojn de la tuta lando, ofte per teroro. La araboj loĝantaj en la lando, kiun ĝis 1948 regis la brita mandato (kiuj ekde 1964 komencis nomi sin "palestinanoj") ne loĝis en tiu lando de antikveco. Ili grandparte venis de la apudaj landoj dum la lastaj jarcentoj. Oni povas argumenti ke temas pri historia procezo, kaj se oni respektas la rajton de palestinanoj loĝi en tiu lando, oni same devas respekti la rajton de la judoj, el kiuj parto loĝis tie multe pli longe ol la araboj, aliaj venis dum la lastaj 150 jaroj, sed ankaŭ tio estas historia procezo. La propagandistoj obstine ripetas, ke Israelo troviĝas sur la araba tero, kiu devas esti redonita al araboj. Ĉi tiu aserto, milde dirante, estas ne tute korekta aŭ eĉ tute ne korekta.

Nuntempa Israelo estis lanĉita sur teritorio de Brita Mandato (kiu regis ĉi tie dum 30 jaroj). Ĉu nun iu asertas, ke tiu estas brita teritorio? Antaŭ Britio la teritorio de Israelo estis parto de Otomana Imperio (dum 402 jaroj). Ĉu nun iu postulas redoni tiun teritorion al Turkio?

Antaŭ otomanoj ĉi tiun teron konkeris mamlukoj – ili estis idoj de aziaj sklavoj, kiuj fariĝis militistoj en Egiptio. Kasto de ĉerkesaj mamlukoj faris puĉon kaj fondis Mamlukan Sultanaton (regis tie 207 jaroj). Ĉu ĉer-

kesoj havas teritoriajn pretendojn al Israelo? Antaŭ la mamlukoj estis periodo de eŭropaj kruckavaliroj (parte dum 192 jaroj). Ĉu posteuloj de Gotfrid la Bulonia postulas redonon de Jerusalemo? Kaj nur antaŭ la kruckavaliroj la teritorion de Israelo konkeris araboj (por 461 jaroj, per tri diversaj kalifujoj: Damasko, Bagdado kaj Kairo). Sed tio estis jam antaŭ preskaŭ milo da jaroj. Kaj antaŭ la araboj en historio de Israelo estis ankoraŭ bizanca periodo (dum 323 jaroj), kurta persa periodo, kaj romia periodo (dum 307 jaroj). Tiumaniere ni venis al antikva Israelo, kies popolo alvenis (la 12 triboj) en ĉ. 1240 AK., konstruis siajn reĝlandojn en 1000 A.K., travivis kelkajn okupantajn imperiojn, nur en la jaro 6 P.K. do, post 994 jaroj, perdis sian sendependecon, sed daŭris vivi tie kiel juda provinco sub romia, poste bizanca regado 300 pluajn jarojn en sia propra aŭtonomio, ĝis 425 P.K., kiam ankaŭ tio ĉesis, ĝis 636 P.K. kiam venis la arabaj konkerantoj. Sed la juda ĉeesto en sia historia teritorio neniam(!) ĉesis, eĉ se ili fariĝis minoritato.
Vere, se ne ekzistus judoj, do multaj aliaj havus pli da rajtoj por ĉi tereno, ol araboj – judoj ja venis pli frue, kaj, sekve, pli longe tretis ĉi tiun teron...
Demando: kiu havas pli da rajtoj?..




## Alparolo de Universala Esperanto-Asocio

*en la debato pri ĝenerala politiko en la 42ª sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en novembro 2023*

La *teksto legita de* **François Lo Jacomo.**

Sinjorino Prezidanto, Ekscelencoj,

Sinjorino Ĝenerala Direktoro, en via enkonduko al tiu ĉi debato pri ĝenerala politiko vi diris: "ne estas facile trovi komunan lingvon, kiun 194 membroŝtatoj povas paroli kune". Nia organizo, Universala Esperanto-Asocio, povas helpi vin pri tio.
La 26-an de julio 1887 aperis la unua manlibro de la internacia lingvo de Doktoro Esperanto, la doktoro, kiu esperas, kaj malgraŭ ĉiuj obstakloj, kiuj stariĝis antaŭ ĝi, Esperanto estas nun parolata de milionoj da homoj en pli ol cent landoj. Nia asocio prezidas la Komitaton pri Lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj.
Jam antaŭ pli ol cent jaroj, la landoj favoraj al Esperanto ene de Ligo de Nacioj reprezentis duonon de la monda loĝantaro. Unesko plurfoje

subtenis nin, per rezolucioj en en 1954 kaj 1985, kaj per diversaj mesaĝoj, inkluzive de vi, Sinjorino Ĝenerala Direktoro. Ni tre dankas al vi pro tio.
Kiam, antaŭ pli ol kvardek jaroj, la eminenta esperantisto kaj tradukisto Claude Piron diris al mi, ke la ĉefa malfacilaĵo por interkompreno ne estas la lingvoj mem, sed la kulturaj diferencoj, mi unue miris. Sed danke al Esperanto, tio iĝis evidenta: ne sufiĉas paroli la saman lingvon por kompreni unu la alian. Tamen, ĉi tiu malfacilaĵo ne estu malhelpo, ĉar precize tiu kultura diverseco igas nian mondon riĉa: ĉiu diferenco estas kolora subtileto, kiu aldoniĝas al nia granda tutmonda mozaiko La vivo estas tro mallonga por studi la 8 300 lingvojn, kiujn via atlaso listigas, sed se anstataŭ dediĉi dekojn da horoj al penado pri la neregulaj verboj de unu el ili, ni tre rapide aliras, danke al simpla kaj senescepta lingvo, jenan duan etapon: interkultura dialogo, ni realigas konsiderindan paŝon al pli bona interkompreniĝo, do al paco.
Nia asocio aktive partoprenas en la festado de la Internacia Tago de Paco, sed ankaŭ en la disvastigo de Unesko-sciindaĵoj, danke al la Esperanta versio de *Unesko-Kuriero*. Nia venonta Universala Kongreso, ĉe la piedo de Kilimanĝaro, en Tanzanio, vigle akcelos la praktikadon de Esperanto sur tiu ĉi rapide progresanta kontinento. Kaj multaj esploroj, precipe danke al la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu akompanas nin en ĉi tiu Ĝenerala Konferenco, pruvas, ke lernado de Esperanto faciligas postan lernadon de aliaj lingvoj. Ni ofertu al niaj infanoj ĉi tiun potencan ilon por pli bone interkompreniĝi.



## “Sur la unua loko por mi ĉiam estas Israelo...”

Israela olimpika ĉampiono Artem Dolgopjat, kiu gajnis la 7.10.2023, unuafoje en la historio, la unuan lokon, ricevinte la “oran medalon” en la monda ĉampionkonkurso pri gimnastiko. Li decidis doni sian ĉampionan medalon al aŭkcio, kaj la gajnotan monon li decidis oferi por la sudaj setlejoj, kiuj estas ĉe la limo kun sektoro Gaza, detruitaj kaj ra-

rabitaj fare de teroristoj de Ĥamas dum la samtaga masakro. Artem gajnis en finalo de monda ĉampionkonkurso en Antverpeno (Belgio). La gimnasto staris sur la gajnopodio kun israela flago kun nigra rubando, kiu simbolis funebron pro la terura buĉado en la sudo de Israelo. Starta prezo por la lotumata medalo estis $100 000.
"Kiom kostas la mondĉampiono, se lia lando suferas? – demandas la gimnasto. – Por mi sur la unua loko ĉiam estas la ŝtato Israelo".
Dudek ses-jara Artem Dolgopjat, devenanta el Ukrainio, laŭmerite estas konsiderata unu el la plej grandaj sportistoj de Israelo. Li gajnis arĝentan medalon en mondaj ĉamponkonkursoj en 2017 kaj 2019 jaroj, poste gajnis olimpikan oran medalon en Tokio en 2021. En la jaro 2022 li, malgraŭ traŭmo de la piedo, gajnis oran medalon en liberstilaj ekzercoj en eŭropa ĉampionkonkurso pri sporta gimnastiko en Munkeno. La triumfo atendis lin aŭtune de 2023...

## Israelo - Gaza.

### Ĝisdatitaj informoj.

(La stato por la 10.02.2024).

**Ŝlomo LERMAN, Gabi Zeevi.**



Militoj certe ne estas la ĝusta rimedo por kunvivadi en paco kaj harmonio. Ĉiuj esperantistoj, en Israelo kaj tutmonde, dividas ĉi tiun idealon. Ni tamen konscias, ke antaŭ la prirevata paco devis okazi milito, kiu por ĉiam forigos la minacon de la terorista regno de ***Ĥamas*** en Gaza-strio, subtenata kaj financata de Irano kaj Kataro. Ilia deklarata celo estas detrui la judan ŝtaton kaj mortigi kiel eble pli da israelaj civitanoj. Dum dudekoj da jaroj la palestina teroro atakis israelajn urbojn kaj vilaĝojn per atencoj, el Libanono kaj Gaza per raketoj. Pro humanaj kialoj, Israelo, kvazaŭ kompense, provizadis al Gaza-strio akvon, elektron, laboron en Israelo, kaj ebligis internacian monan subtenon. Nun denove evidentiĝis, ke tiun subtenon Ĥamas uzadis ne por helpi al sia popolo en Gaza-strio, sed por konstrui pli da raketoj, pli da subtera tunel-urbo (ĝis nun oni taksas ilian longecon je 700 kilometroj, pli ol la novjorka metro-sistemo), kaj trejni pli da teroristoj por murdi laŭeble plimultajn israelanojn.

Dum la "nigra sabato" la 7-an de oktobro ili sukcesis suprize ataki Israelon – ĝuste kiel okazis antaŭ 50 jaroj – dum juda festotago (Ĝojo de la Torao, la lasta tago de Festo de Laŭboj). Ili masakris (eĉ brulmortige) 1400 israelanojn, el ili 1200 civilulojn (plurdekoj el tiuj estis israelaj araboj, tajlandanoj, filipinanoj, kristanaj vizitantoj), grandparte maljunulojn, virinojn, infanojn kaj bebojn, eĉ tutajn familiojn en ties hejmoj en dudeko da apudlimaj vilaĝoj kaj urbetoj, parte detruitaj, forbrulitaj. Ili ankaŭ seksatencis virinojn kaj senkapigis bebojn. Multaj, ĉefe junuloj, estis murditaj en proksima granda plenaera muzikfestivalo. Tiu estis la plej granda nombro de judoj murditaj dum unu tago post la Holokaŭsto. Ĉirkaŭ 240 israelanoj estis kidnapitaj al Gaza-strio, multaj el ili maljunuloj, virinoj, estis 30 infanoj, kaj estis forrabitaj multaj kadavroj.
Frumatene en la unua tago ili subite komencis bombardi Israelon per pli ol 5000 raketoj, ĉefe la proksimajn al Gaza loĝlokojn, kaj atingis eĉ la grandurbojn de la centro de Israelo. Sub la ombro de la raketoj ĉ.1500 teroristoj en uniformo, kaj 1500 gazaaj "civiluloj" rompis la barilon inter la Gaza-strio kaj Israelo, venis sur aŭtoj kaj motorcikloj, okupis 23 israelajn loĝlokojn, murdis, kidnapis kaj detruis, bruligis homojn kaj domojn.
Kion ili volis atingi per la far ili iniciata milito? Ĉu ili liberigos per tio la judan ŝtaton inter la maro kaj la Jordano (kiel ili deklaris), timigos la 7.7 milionojn da judoj (80% da ili estas jam indiĝenoj, kiuj ne havas alian hejmlandon), ĝis ili forlasos Israelon? Certe ne! Ĉu ili pensis, ke Israelo forviŝos la larmojn, kaj ne reagos? Verŝajne ne. Ĉu ili volis trakti pri plibonigo de sia vivo post tiu "milita venko"? Do, post tiu brutala murdo-kampanjo ni ne povas simple eksidi kun ili kaj diskuti pri kondiĉoj. Male: 3 tagojn antaŭ la subita atako, la israela registaro traktis pri pligrandigo de la nombro de la gazaaj laboristoj, kiuj trapaŝis la limon ĉiutage por labori en Israelo, ricevis bonan salajron kiun ili portis hejmen, per tio ili nutris la gazaan ekonomion per triono de ĝiaj enspezoj. Ni kredis, ke kiom ilia ekonomia stato pliboniĝos, tiom ilia rilato al Israelo normaliĝos (ja ili entute ne rekonas la rajton de judoj vivi en "sankta islama lando"). Nia koncepto estis erara, ni ne komprenis ilin. Ilia ideologio estas tre forta, ilia konstitucio klare deklaras ĝin, ili preparis tiun militon almenaŭ dum du jaroj, inventis en ĝin miliardojn da dolaroj. Ni ne emis rekoni tion. Israelo povis reagi nur per milito, havante 3

celojn: la disrompi la Ĥamas-reĝimon, la liberigon de la kidnapitoj, kaj rekonstruon de la Gaza-strio sub neŭtrala, teknika registaro, kies “ideologio” estas la bonfarto de sia popolo. La sur- kaj subtera milito komenciĝis du semajnojn post la “nigra sabato”, dum tiuj tagoj Israelo petegis la civilan loĝantaron de la norda parto de Gaza forlasi tiun parton, ĉar komenciĝos nia rebato. Estis senditaj al ili milionoj da telefon-atentigoj, dispersitaj milionoj da faldfolioj – kaj poste nia armeo eniris kaj komencis disrompi la militan strukturon de Ĥamas.
Bedaŭrinde ankaŭ la palestina loĝantaro de Gaza suferas kaj suferos multe pro la militoj iniciatita de iliaj regantoj. La falsa propagando de la teroristoj ekspluatis eĉ la fuŝan misilan lanĉon far ***Aljihad Alislami*** (teror-organizo rivala al Ĥamas), kiu trafis hospitalon en Gazao kaj mortigis multajn, por akuzi Israelon. Domaĝe, evidentiĝis, ke preskaŭ ĉiu dua-tria domo en Gaza havas ŝakton al la subteraj tuneloj, havas kolektojn da armiloj, eĉ raket-lanĉilojn. Ekde tiam, post 4 monatoj, 60% de la nord-gazaaj domoj estis disrompitaj, multaj kilometroj da tuneloj kaj ĉ 300 ŝaktoj eksploditaj. Ĉirkaŭ 30 miloj de gazaanoj mortis, inter ili ĉ. 13000 teroristoj en uniformo kun armiloj en la mano, kontraŭ niaj soldatoj, el kiuj mortis pluaj 300. Centoj de Ĥamas-teroristoj, inter ili altrangaj, estis kaptitaj aŭ kapitulacis. Ili donas valorajn informojn pri la planoj kaj iloj de la organismo.
Por sekvi la internaciajn militajn normojn, ni liveras aŭ lasas liveri la minimuman vivtenan bezonon de la 2.2 miliona gazaa loĝantaro: 200 ŝarĝaŭtomobilojn ĉiutage, kun akvo, faruno, manĝaĵoj, medikamentoj kaj benzino.
Tamen, la propagando forte agadas kontraŭ ni: tra la tuta mondo organiziĝis por-palestinaj demonstracioj, kiuj pravigas la atakon de Ĥamas, eĉ krias la sloganon: “De la rivero ĝis la maro liberiĝu Palestino” - kiu signifas la postulon neniigi la Judan Ŝtaton. Sub tiu slogano unuiĝis la ekstrema islamismo, la kontraŭjuda dekstra antisemitismo, kaj la maldekstra intelektularo, kiu pensas sin “objektiva”, volas apogi la “malfortan viktimon” kontraŭ la forta, neniam prava subpremanto (Ili ne estas antisemitoj, “nur” anticionistoj, inter ili ankaŭ multaj judoj). La plejmulto de ĉiuj tri partoj konas nek la historion de la 150 jara konflikto, nek la detalojn de la eventoj, certe ne la mult-miljaran historion de la regiono – nur sur-

facajn sloganojn. Ekstreme: Sud-Afriko apelaciis kontraŭ Israelo en la internacia kortumo de Hago, Nederlando, kun la akuzo de genocido far ni, - ne menciante la atakon de Ĥamas, kiam ili murdis homojn senelekte, nur ĉar tiuj troviĝis en Israelo, - kontraŭ la israela sinteno, kiu ne volas mortigi iun ajn nur pro estanta gazaano, inverse! Alia ekstremismo: la husi-jemenanoj komencis raketadi la israelan urbon Eilat de distanco de 2200 kilometroj, pro solidareco kun la palestinanoj. Ilia ĉefa celo: bloki la internacian maran vojon tra la Bab el Mandeb markolo, kiu gvidas interalie al Israelo, atakante civilajn komercŝipojn, rompante la internacian leĝon.
La samon faras la libanona Ĥizballa en la nordo: ĉiutage bombadas la tutan israelan regionon apud la internacia landlimo, ili celas ĉefe civilajn privatajn domojn. Pro tio – 120 mil israelanoj estas evakuitaj jam 5 monatojn, ili loĝas en hoteloj aŭ kiel gastoj en aliaj loĝlokoj, je la kosto de la ŝtato, iliaj domoj estas plejparte detruitaj, iliaj entreprenoj aŭ laboroj estas plejparte malebligitaj. Ankoraŭ 134 kidnapitoj estas en la manoj de Ĥamas, ankoraŭ neniu, eĉ ne la Ruĝa Kruco povis viziti ilin, ni ne ricevis iun ajn liston kun iliaj nomoj, kun ilia stato, ni ne scias, ĉu la senditaj al ili medikamentoj atingis ilin aŭ ne. Inter ili estas ankoraŭ kaj infanoj kaj pli ol 80-jaraĝuloj. Ankaŭ kadavroj de homoj, kiujn ili forrabis, aŭ murdis / lasis morti dum la kaptiteco. Pri 32 el ili ni ricevis ĉiuspecajn informojn, atestojn, laŭ kiuj ni deklaris ilin – mortintoj. Ĉu estas pli? – ni ne scias. Ĉu estos pli? – supozeble jes. La milito daŭriĝas, kaj ĉi-foje ankoraŭ ne vidigas la fino, iu ajn solvo.
Ni esperu, ke post la forigo de tiu murdista regno, eblos restaŭri ambaŭ landojn, kaj la Gaza-strion kaj la israelan najbaran regionon, ankaŭ la nordan ĉe-liman regionon, por paca kunekzistado inter la najbaraj landoj kaj popoloj.

## EN ĜENERALA ASEMBLEO DE UNo,

kiu estis iniciatita de lideroj de Eŭropunuaj Landoj kaj nova araba bloko, parolis reprezentanto de Israelo Mirjam NOVAK.
Starante ĉe alta tribuno de la ĉefa salono por la kunsidoj ŝi diris:


Mirjam NOVAK

Gesinjoroj! Kiel vi scias, antaŭ 80 jaroj Eŭropo kape

kun Germanio okazigis "etnan purigon": estis masakritaj preskaŭ ĉiuj judoj loĝintaj tie. Francoj, belgoj, nederlandanoj, norvegoj, hungaroj, slovakoj, poloj, litovoj, ukrainoj - ĉiuj helpis al la faŝistoj.Vi murdis minimume 6 milionojn da judoj kune kun ĵusnaskitaj infanoj. Ĉiu el ili povis donaci al la mondo infanojn, nepojn kaj pranepojn, tial la kvanton da murditoj eblas kvarobligi kaj kvinobligi... Kaj nun, kiam nin denove oni rabas, krude batas kaj murdas en ĉiuj viaj landoj, kaj viaj juĝistoj liberigas murdistojn, vi diras al mi, ke ni ne havas rajton defendi nin? Ĉu ni ne rajtas averti niajn malamikojn, ke al nova "etna purigo" ni respondos per pli potenca rebato? Eble vi povas nomumi ankoraŭ iun nacion, por masakro de kiu tiel fanatike strebas via nova internacia komunumo kape kun Irano? Sed pro kio?
Dumil jarojn ni vivis inter vi, donante al vi niajn sciojn, malkovrojn kaj inventaĵojn. Ni donis al vi alfabeton, Biblion, la Virgulinon Maria, Jesuon Kriston, dekduon da apostoloj, homojn kiel Baruĥ Spinozo (filozofo, Nederlando), Benjamin Disraeli (politikisto, min.prezidento, Britujo), Kristoforo Kolumbo (navigisto, Hispanio), Miŝel de Nostradamus (astrologo, Francujo), Heinriĥ Heine (poeto, Germanio), Feliks Mendelssohn (komponisto, Germanio), Albert Einŝtein (fizikisto, Germanio-Usono), Sergej Eizenŝtejn (filmreĝisoro, Sovetunio), Sigmund Freud (neŭrologo, psikologo Aŭstrujo), Lev Landaŭ (atomfizikisto, Sovetunio) Ĝorĝ Gershwin (komponisto, Usono), Ĵak Offenbaĥ (komponisto, Francujo), Artur Rubinŝtejn (pianisto, Pollando-Usono), Franc Kafka (verkisto, Ĉehio-Aŭstrio), Cezare Lombrozo (kriminologo, Italujo), Gustav Mahler (komponisto, Ĉehio-Aŭstrio), Marcel Marceau (pr. "Marsó" - pantomimisto, Francujo), Jehudi Menuĥin (violonisto, Usono), Stefan Zweig (verkisto, Aŭstrio), Arthur Miller (verkisto, Usono), Maja Pliseckaja (balet-dancistino, Sovetunio), Edward Teller (atomfizikisto, Usono), Paul Newman (pr. "Njumen", kino-aktoro, Usono), Robert Oppenheimer (atomfizikisto, Usono), Imre Kalman (komponisto, Hungario), Mark Chagall (pr. "Ŝagal", pentristo, Belarusio-Francio), Barbra Streisand (aktorino, Usono), Steven Spilberg (kino-reĝisoro, Usono), Leonard Bernstein (komponisto, Usono), Andrew Lloyd Webber (komponisto, aŭtoro de rok-opero "Jesus Kristo – superstar", Usono), Mark Zukerberg (inicianto de Facebook, Usono), Sergej Brin (inicianto de Google, Usono) — kaj ankoraŭ multaj miloj da sciencistoj kaj klerigantoj. Vi provu imagi, kiun kvanton da geniuloj povus naski por la mondo mur-

ditaj de vi milionoj da judoj, kaj poste iliaj infanoj, nepoj kaj pranepoj! Sed tiuj nenaskitaj geniuloj por ĉiam malaperis en kremaciejoj, bruligitaj sinagogoj kaj amastomboj. Kaj ĉu vi opinias, ke per viaj rezolucioj, bojkotoj kaj sankcioj nin denove eblos peli en gaskameraojn? Ne, gesinjoroj! Travivinte inter vi du jarmilojn, ni estis devigitaj akomodiĝi al vi, kaj ellerni ne nur viajn lingvojn, sed ankaŭ ion el via psikologio. Alimaniere, kiel ni povus resti vivaj en Persio, sen persa perfidemo? Kaj en Hispanio, sen hispana krueleco? En Germanio, sen germana humileco kaj disciplino? En Francio, sen franca avareco? En Pollando, sen pola aroganteco, kaj en Rusio, sen konstanta blasfemado kaj rusia alkutimiĝo al enkortaj necesejoj, kie necesis sidi en pozo de aglo kaj paroli pri sia spirita grandeco? *(rido en la salono)*.

Kaj krome, mi diros al vi sincere: jes, ni ne estas anĝeloj. Inter ni estis internaciaj fi-aferistoj kaj gangsteroj, friponoj, ŝtelistoj, rabistoj, aventuristaĉoj kaj eĉ pedofiliuloj. Sed dum tuta nia kaj via historioj ne estis juda Bohdan Ĥmelnickij, Adolf Hitler kaj Josef Stalin. Ne estis juda Josef Mengele, Adolf Eiĥmann kaj Idi Amin. Ni ne faris kolringojn el homaj oreloj, ne deprenis skalpojn, ne manĝis homan karnon, ne produktis sapon el homa graso, ne kudris abaĵurojn el homa haŭto, ne faris matracojn el virinaj haroj, ne bruligis homojn en temploj kaj ne mortigis infanojn en gaskameraoj. Anstataŭ ĉio tio ni kreis aĵojn, kiuj ŝanĝis la mondon al pliboniĝo.

Gut-irigacio, sensaligo de mara akvo, procesilo Intel kaj platformo Centrino, plej eta en la mondo sur DNA-bazita komputilo, la unua en la mondo USB-flaŝ-memorkarto, englutebla videokamerao, ku-racilo de multloka sklerozo, vidanta kaj laŭtleganta kamerao sur okulvitroj por blinduloj, radaro povanta vidi tra muro, kaj ankoraŭ centoj da bonegaj kaj viv-plibonigaj eltrovaĵoj.

Konsistigante nur 0,2% de la homaro, ni donis al la mondo 22% de Nobel-premiitoj. Jes, mi forgesis diri: ni neniam uzis sangon de kristanaj beboj ĉe produktado de maco. Tion pruvis en 1913 tri kristan-ortodoksaj ekspertoj pri judismo en fama proceso en Kijivo (tiam Rusia imperio) en kulpigo de Bejlis. En la 1962-a jaro la Dua Vatikana Koncilio deprenis de ni kulpon pro la krucifikso de Jesuo, kaj en 2011 la romia papo Benedikto XVI deklaris, ke "kristano ne povas esti anti-

semito, ĉar ni havas la samajn radikojn". En la 2019-a jaro lia posteulo Francisko I diris, ke "interne de ĉiu kristano estas judo" kaj "ne eblas esti vera kristano, ne agnoskante siajn judajn radikojn". Plie, la ĉefo de tutmonda katolika eklezio deklaris, ke "interkonsento inter Dio kaj la judoj daŭre validas", kaj "antisemitismo estas konsiderata ne nur atako kontraŭ la judoj, sed kontraŭstaro ankaŭ al Israelo".
Kaj fine, junie de 2020 pastoro John Hagi, ĉefo de usonaj kristanoj-evangelistoj, publikigis sian "Apelacion al tuta mondo", en kiu li diris simple kaj klare: "Kial ni, multaj milionoj da kristanaj patriotoj subtenas Israelon? Ĉar Dio defendas Israelon! Se kristano diras, ke li ne ŝatas judojn, sekve lia kristaneco estas ege dubinda, falsa". Dio diras: "Mi benas tiujn, kiuj benas Israelon. Mi malbenos tiujn, kiuj malbenas Israelon!"
Kaj nun mi volas demandi la eŭropajn delegitojn, sidantajn en la salono: kiel kio vi vin konsideras? Ĉu vi estas kristanoj aŭ ne kristanoj? Kiam vi preĝas al Jesuo Kristo, Dipatrino kaj la sanktaj apostoloj, ĉu vi preĝas ne al judoj? Kaj kiam vi diras, ke vi portas en la koro aspekton de Kristo, ĉu vi agnoskas, ke vi portas judon en via animo? Eĉ, se vi estas ardaj ateistoj, tutegale viaj antaŭuloj estis kristanoj antaŭ du miljaroj kaj, sekve la judeco estas en via sango - vole aŭ nevole.
Do, gesinjoroj, se vi insistas pri internacia bojkoto de Israelo, ĉar vi daŭre malamas judojn kaj volas plenan masakron de judismo sur la tero, estu do sinsekvaj - komencu de vi mem, suicidu! Dio helpu al vi liberiĝi de antisemitismo!
Kaj tio estos honesta "etna purigo". Kaj nun, kiel oni diras ĉi tie, en Usono, mi havas novaĵon por vi. Nun, tuj post kristanoj, venis vico de muslimoj foriri de antisemitismo. Jes, tio ne estos simple, sed same, kiel la Plej Supera helpis al la homaro resaniĝi de pesto, siberia ulcero, ĥolero kaj koron-viruso, sammaniere Li helpos al vi liberiĝi de antisemitismo.
Vi povas demandi min: por kio? Kiucele la Plej Supera revenigis nin en Israelon kaj devigas nin rezigni de strebado nin ekstermi? Ja devas Li havi iun celon, ĉu ne?
Mi diros al vi mian personan opinion. Ĉar, laŭ Lia ideo, ĉiu popolo devas doni al la homaro tion, kion ĝi faras plej bone.
Do, la francoj donis kulinarojn kaj parfumistojn, la britoj kaj la rusoj - verkistojn kaj poetojn, la italoj - pentristojn kaj muzikistojn, la germanoj - soldatojn kaj filozofojn, kaj ni, la judoj - donis multajn elstarajn

homojn en multaj terenoj. Geniulojn, kiuj klopodis movi la homaron de sovaĝeco kaj idolismo – al kulturo, humaneco kaj teknika progreso. Ĝuste tio estas nia misio, kiun ni sekvas tion jam de miljaroj, malgraŭ ĉio!
Ĉu havas ni iun ajn armilon por defendi nin - tio vin ne koncernas! Ĉu vi permesos al ni havi la defend-armilojn aŭ ne - por ni tio ne gravas!
Kiel diris iam unu el fondintoj de nia ŝtato, Zeev Ĵabotinski: "Ĉu plaĉas ni al vi aŭ ne, ni indiferentas al tio. Ni venis pli frue al la Mondo ol la plimulto de vi, do malpli frue ni foriros".

## Eksterteranoj estas ĉi tie

(Usonaj Kongresaj Aŭdioj pri Nifoj)
Tatiana Stezhar 08.08.23 (koncizigite)

**Gabi ZEEVI**



Iama spionoficiro David Grash asertas, ke usonaj aŭtoritatoj kaŝas informojn pri eksterteraj objektoj, sekrete esplorante kraŝitajn ŝipojn kaj eksterterajn restaĵojn – sen kunordigo kun la Kongreso. La Pentagono neas ĉi tiujn asertojn.
Du altpostenuloj de la usona aerarmeo parolis sub ĵuro pri siaj renkontoj kun NIFOJ, kaj usona spionofici-ro diris, ke li pretas indiki sekretajn lokojn, kie la res-taĵoj de eksterterana alteriĝo estis kaŝitaj.
Ĝis antaŭ nelonge, la ideo de eksterteranoj estis nure popola rakonta spekulado - samkiel la zombia apokalipso, nuklea vintro kaj superherooj. Tamen, ĉe aŭdiencoj okazigitaj en la Usona Senato, pluraj homoj atestis sub ĵuro kaj deklaris: krom la homaro, ekzistas ekstertera, inteligenta vivoformo. Kaj Usono kaŝas pruvojn de ĉi tiu ekzisto.

**Spacvizitoj**

En februaro 2023, la usona aerarmeo pafis neidentigitajn flugajn objektojn dum tri tagoj sinsekve. La unua estis super Alasko la 10-an de februaro pafita per ĉasaviadilo F-22; ĝi havis "cilindran formon". La dua estis surterigita tagon poste super la Jukonio-regiono. Ĝi estis malkovrita, kiam ĝi eniris kanadan aerspacon, post kio Biden kaj Trudeau konsultis kaj rajtigis la faligon. Laŭ kanada ministro pri defendo, la celo trafita estis en alteco de 14-15 km kaj estis malgranda, cilindro-

forma.
La tria NIFO estis faligita super Hurona Lago en Miĉigano fare de F-16. La Defendo-Sekcio diris ke la objekto estis ekvidita pli frue super Montano, sed ne povus esti kaptita per ĉasaviadiloj. Laŭ novaĵ-agentejoj, la tria objekto estis okangula laŭ formo, kun ŝnuroj pendantaj malsupren, sed havis neniun videblan utilan ŝarĝon.
Oni vidis neniun indicon ke la objekto havis motoron. La NIFO mem estis priskribita kiel cilindra, kaj kiu havis arĝentegrizan koloron.
Komentante tiujn tri epizodojn, proparolanto de la Nacia Sekureckonsilio John Kirby diris, ke la origino kaj celo de la faligitaj objektoj estis neklaraj, ke ili estis malgrandaj en grandeco, ne havis videblan piloton, kaj ne havis iujn ajn elementojn kiuj permesus al ili manovri dumfluge kaj ĝenerale resti surloke en la aero. La unua objekto estanta faligita estis sufiĉe impona en grandeco.
Kirby krome klarigis, ke la faligitaj objektoj ne prezentis danĝeron por la homoj, kaj kiam oni demandis, kial ili estis pafitaj en ĉi tiu kazo, li respondis, ke prezidanto Biden aŭskultas la konsilon de la armea komando, ke usonanoj ne devus alfronti eĉ hipotezan danĝeron. Li ankoraŭ aldonis, ke la dua kaj tria objektoj flugis je tiom malalta altitudo, ke ili prezentis danĝeron por civilaj aviadiloj. Kirby certigis, ke ne ekzistas signoj indikante eblan eksterteran originon de la misteraj objektoj. Pri ilia deveno li diris: “Ni simple ne scias”.

**Nova Manhattan-Projekto**
La pruvo mem pri ekzisto de NIFO-j estas principe nekontrolebla. Lia atesto resumiĝis al tio, ke la usona registaro faris titanajn klopodojn por konservi la ĝeneralan publikon neinformita kaj pri la ĉeesto de eksterteraj formoj de inteligenta vivo kaj pri la verŝajnaj kontaktoj inter tiuj formoj kun reprezentantoj de la homa raso.
Grash: “La administracio havas ilojn de timigado por silentigi homojn, precipe ŝtatoficistojn, kiuj zorgas pri siaj karieroj kaj siaj reputacioj. Kiam kariera progreso estas minacata, multaj homoj retiriĝas”.
Li aldonis ke “la kulturo de sekreteco ĉirkaŭ NIFO-j estis heredita de la Projekto Manhattan de Oppenheimer”. Laŭ lia opinio, la eltrovaĵo restis sekreta fare de la aŭtoritatoj, ĉar ili ne estis certaj, kiom ŝoka ĝi estus por la monda loĝantaro.
Kiam oni demandis lin, ĉu li kredas, ke la usona registaro havas fizikajn signojn de NIFO-j, Grash respondis: “Absolute, surbaze de inter-

vjuoj kun pli ol kvardek atestantoj dum kvar jaroj”. Jen, liaj ĉefaj punktoj:

• Usono scias pri nehoma agado ekde la 30-aj jaroj de la antaŭa jarcento (li preferas uzi la terminon “nehoma” prefere ol eksterterana aŭ ekstertera. “Usonaj aŭtoritatoj ekposedis kosmoŝipon kiu estas supozeble ne homa” – tiu opinio estas bazita sur veturilo-morfologio kaj studo de materioj, samkiel la posedo de unikaj atomstrukturoj kaj radiologiaj ŝpurstampoj:

• Usono akiris aliron al tiu ŝipo kiel rezulto pro ĝia kraŝo sur la planedo Tero;

• Usono scias tutan alian inĝenieradon ol tiu de la frakasiĝinta ŝipo;

• Nehoma biologia materio estis malkovrita ĉe la kraŝloko, laŭ homoj kun rekta scio pri la temo, kaj kiuj ankoraŭ okupiĝas pri ĝi; Demandite fare de unu kongresanino, “Ĉu vi kredas, surbaze de via scio kaj ampleksaj konversacioj kun ekspertoj, ke la usona registaro faris kontakton kun inteligentaj eksterteranoj? “ - David Grush respondis: “Tio estas temo, kiun mi ne povas diskuti”. Laŭ li, en la kadro de siaj oficialaj devoj, li estis rifuzita aliri al la esplor-programo por la restarigo kaj ekkompreno de la inĝenierado de la ekstertera ŝipo. Ĉi tiu deklaro estis kategorie neita flanke de la Pentagono. Defend-reprezentantino Sue Gough diris, ke la Pentagono havas “neniujn kontroleblajn informojn por pruvi la asertojn, ke tiaj specifaj esplor-programoj pri inversa inĝenieristiko kaj pri eksterteraj materialoj”. Ĝeneralaj esploroj ekzistis en la pasinto aŭ ekzistas eĉ nuntempe. Grash ne estas la sola, kiu renkontis obstaklojn. Tim-Burchett, respublikana kongresano el Tenesio kaj unu el la gvidantoj de la esploro pri NIFOJ, diris, ke Usono havas pruvojn de tekno-



La fotaĵo “Glacia lito” gajnis en la konkurso, anoncita de londona Muzeo pri Naturo. Ekspedicia ŝipo de Nima Sarikhani dum 3 tagoj serĉis blankajn ursojn kaj dumvoje li ekvidis tiun ĉarmaĵon - blanka urso dormas sur la glacimonteto.

logioj, kiuj defias ĉiujn leĝojn de nia fiziko, kaj ke eksterteraj ŝipoj havas teknologiojn, kiuj povus meti nin en karbofajron.
Kiam la leĝdonanto estis demandita, ĉu li vidis decidajn pruvojn ke Usono vidas aferojn sur la ĉielo kiuj povus esti de ekstertera origin-no, li respondis: "Ho, cent procentoj. Cent procentoj. Absolute!".

(*NDLR - daŭrigota en la sekva "Israela Esperantisto" - 178*)

## MI KREDAS JE LA BONO. MI KREDAS JE ESPERANTO

**Claude PIRON**



Mi kredas je la Bono. Kaj, male al multaj homoj, mi kredas, ke Bono tute ne simetrias kun Malbono, sed ege superas ĝin. Malbone konstruita domo disfalas. Bone konstruita rezistas al la atakoj, de naturaj, eĉ plej teruraj fortoj. Tial mi havas neniun dubon pri la estonteco de Esperanto. Se oni komparas ĝin kun la aliaj rimedoj interpopole komunikiĝi, estas klare, ke ĝi estas la plej bona. Mi perceptas, ke Esperanto estas unu el la konkretiĝoj de la Bono.

Ekzistas tri sistemoj de internacia komunikiĝo: burokrata, ĝangala kaj demokratia. La burokrata sistemo estas tiu de la internaciaj organizaĵoj, kiel UNo aŭ la Europa Unuiĝo. Kiel ĉiuj burokrataj sistemoj, ĝi uzas gigantajn kvantojn da papero, tempo, mono, elektro, homa energio por mizeraj rezultoj. Kaj ĉion ĉi pagas la impostpaganto.

La ĝangala sistemo estas tiu, en kiu unu lingvo, kaj sekve unu kulturo, unu nacio aŭ grupo de nacioj, ricevas monopolan pozicion ne pro la propraj kvalitoj de la koncernaj lingvo aŭ kulturo, sed sole pro politikaj, ekonomiaj kaj similspecaj faktoroj, kiuj neniel rilatas al la postuloj de lingva komunikiĝo kontentiga por ĉiuj. Tia estis la sistemo komunikiĝi per la franca en la dek-naŭa jarcento, tia estas la internacia uzo de la angla en la nuna. Tiu sistemo, kiu privilegias la anojn de unu kulturo, havas multajn fiajn efikojn, kiuj kreas en la mondo danĝerajn fuŝ-ekvilibrojn, se diri nenion pri la katastrofaj kulturaj konsekvencoj de tia lingva sintrudemo.

Kaj al la burokrata sistemo, kaj al la ĝangala mankas unu el la ĉefaj ingrediencoj de homa boneco, nome sento. Ili estas sensentaj sistemoj.

Mankas al ili ĉefe kunsento, kompato, sento pri justeco kaj komunika komforto, konsidero al la bezonoj de tiuj, kiuj estas etaj kaj malfortaj, sento pri homa digneco kaj pri la rajto de ĉiu renkonti iun, kiu aŭskultos kaj komprenos, iun, kun kiu eblos senprobleme komunikii.

La tria sistemo estas la demokratia. Ĝi nomiĝas Esperanto. Kiel ĉio demokratia, ĝi havas multajn mankojn, multajn malperfektaĵojn. Sed ĝi, tamen, estas la plej justa, la plej efika, la socie kaj psike plej kontentiga sistemo. Unuvorte, ĝi estas bona. Ĝi naskiĝis el la boneco de unu homo. Ĝi naskiĝis el sento de kompato, de solidareco, el postulo al justeco kaj homa digneco. Jes, ĝi estas bona. Kaj tial ĝi supervivos la aliajn.

Mi kredas je Esperanto. Mi kredas, ke tiu lingvo estas multe pli valora ol la plimulto el la esperantistoj konscias. Mi kredas, ke ĝi solvos multe pli da problemoj en la estonteco de la homaro, ol estas ĝenerale imagate, eĉ inter ni. Mi kredas, ke ĝi povas forigi multajn suferojn, pri kiuj homoj ne konscias, kaj kiuj estas ligitaj al la manko de interkomprenilo.

C.Piron. Kial kaj kiel lerni Esperanton. Oomoto, 1995, N 437, p. 22-24

*NDLR. Mi havis feliĉon dufoje konversacii kun Klaŭdio.*

KONSILIGA TABELO

| **Kion petas la organismo?** | **Kio mankas en la organismo?** | **Dezirindas manĝi:** |
|---|---|---|
| Ion grasan | Kalcio | Brokolon, fromaĝon, sezamon |
| Ion dolĉan | Magnezio | Nuksojn, vinberojn, fagopiron |
| Ion salan | Kloridoj | Nuksojn, lakton, fiŝojn. |
| Ion rostitan\frititan | Karbono | Freŝajn fruktojn |
| Neregebla la apetito | Amin-acidoj, zinko, silicio. | Spinacon, freŝajn fruktojn, mar-nutraĵojn. |

**GIMNASTIKO POR CERBO** (Prenita el FACEBOOK)

Iris kavaliro tra dezerto. La vojo estis longa. Laŭvoje li perdis la ĉevalon, kaskon kaj kirason. Restis nur la glavo. La kavaliro estis malsata kaj turmentis lin soifo. Sed jen, ne malproksime li ekvidis lagon. Koncentris li la fortojn kaj iris al la akvo.

Sed ĉe la lago sidis trikapa drako. La kavaliro levis la glavon kaj per restintaj fortoj li komencis batali kontraŭ la monstro. Diurnon daŭtis la batalo, la duan… Du kapojn de la drako li dehakis. La trian diurnon la drako senfortiĝis kaj falis sur la sablon. Apuden falis senfortiĝinta kavaliro – ne plu povanta stari kaj teni la glavon.



La laciĝinta drako apenaŭ aŭdeble demandis:

- Kavaliro, kion efektive vi volis?
- Akvon trinki…
- Do, ĉu iu ne donis al vi eblon tion fari?

***La moralo***: ne komplikigu mem vian propran vivon!

## VIROJ, NE ESTU EGOISTOJ!

La geedzoj festas en restoracio 35-jariĝon de ilia komuna vivo. Subite ĉe la tablo aperas feino kaj diras:

- Pro tio, ke vi jam 35 jarojn kunas, ĉiu el vi povas elekti plenumendan deziron.

La edzino: - Mi volas vojaĝi kun la edzo...

Tuj en ŝia mano aperas du biletoj por ĉirkaŭmonda krozado sur ŝipo.

Venis vico de la edzo. Li enpensiĝis kaj diris:

- Tio estas tre bone, sed tiu ŝanco okazas nur foje en la vivo... Mi volas edzinon, kiu estu 30 jarojn pli juna ol mi...

La edzino estas ŝokita, same la feino, sed deziro, tamen, estas deziro.

Nu jen!!! Pretas!!! Upppssss! La edzo fariĝis 92-jara maljunulo!

**La moralo**: sendankaj viroj, memoru, ke ankaŭ feinoj estas virinoj!

***

## DANĜERA FUMADO

- Karulo, kial sub via okulo estas tiu granda bluaĵo?
- En nia laborejo sub la slogano "Guto da nikotino mortigas ĉevalon", staris korpulenta fumanta virino. Mi rigardis al la slogano, poste al la virino kaj iucele prononcis: "Ne ĉiun..."

**Aleksandr KUPRIN**
Populara rusia kaj sovetia verkisto.
Tradukis, laŭ peto de la redaktoro,
**Mikaelo BRONŜTEJN**

## LA JUDINO

Ho, tiu mirinda, nekonceptebla juda gento! – pensis Kaŝincev. – Kiuj elprovoj estas destinitaj por ĝi en onto? Dekojn da jarcentoj trapasis ĝi, kun neniu alia miksiĝante, elekteme apartiĝante de ĉiuj nacioj, kaŝante en sia koro eternan funebron kaj eternan flamon. La bunta, vastega vivo de Romo, Grekujo kaj Egiptujo ekde longe iĝis posedaĵo de muzeaj kolektoj, historia deliraĵo, fortempa fabelo, sed tiu mistera gento, kiu jam patriarkis en la tagoj de ilia bebaĝo, ne nur daŭre ekzistas, sed ankaŭ konservis ĉie sian firman, ardan sudan enon, konservis sian kredon, plenan je grandaj esperoj kaj skrupulaj ritoj, konservis la sanktan lingvaĵon de siaj inspirplenaj didonitaj libroj, konservis sian mistikan alfabeton, kies nura skribmaniero alblovas miljaran antikvecon! Kion ĝi travivis en la tagoj de sia junaĝo? Kun kiu ĝi negocis kaj kontraktis unie, kontraŭ kiu ĝi militis? Nenie restis spuroj de ĝiaj misteraj malamikoj, de ĉiuj ĉi filiŝtoj, amalekidoj, moabidoj kaj aliaj duonmitaj popoloj, sed ĝi, malrigida kaj senmorta, daŭre vivas, kvazaŭ plenumante ies supernaturan destinon. Tuta ĝia historio estas penetrita de tragedia hororo kaj plene verŝita je propra sango: la centjaraj kaptitecoj, perforto, malamo, sklaveco, torturoj, fajroj el homa karno, elpelado, senrajteco... Kiel sukcesis ĝi restadi viva? Ĉu efektive la sorto de popoloj posedas proprajn, nekompreneblajn por ni, misterajn celojn?.. Kiu scias: eble iu supera forto ŝatis ke la judoj, perdinte sian patrujon, rolu eternan fermentaĵon en la grandioza monda bobelado?

Jen staras virino, en kies vizaĝo respeguliĝas dieca belo, inspiranta sanktan ravon. Kiom da jarmiloj ŝia gento devis intermiksiĝi kun neniu por konservi tiujn mirindajn bibliajn vizaĝtrajtojn? Kun la sama glata kaptuko, kun la samaj profundaj okuloj kaj kun funebra

sulketo ĉe la lipoj oni prezentas en pentraĵoj la patrinon de Jesuo Kristo. La sama senriproĉe pura ĉarmo brilas ankaŭ en la morna Judit kaj en la humila Rut, kaj en la tenera Lea, kaj en la fascina Raĥel, kaj en Hagar, kaj en Sara. Rigardante ŝin oni kredas, sentas kaj plencerte vidas ke tiu gento venas en sia genealogio al Moseo, ascendas al Abrahamo kaj pli sor, eĉ pli sor – ĝuste al la majesta, terura, venĝema biblia Dio!
Kun kiu mi diskutis antaŭ nelonge? - subite rememoris Kaŝincev. – Mi diskutis pri la judoj. Ŝajnas ke kun kolonelo de la ĝenerala stabo en vagono? Aŭ, tamen, ne: la diskuto estis kun la urba kuracisto el Stepani. Li diris: la judoj kadukiĝis, la judoj perdis la naciecon kaj la patrujon, la juda gento devas degeneri, kaŭze ke ĝin ne penetras eĉ unu guto da freŝa sango. Restas por ĝi elekto: ĉu ĝi asimiliĝu kun aliaj gentoj, dissolviĝu en tiuj, aŭ ĝi pereu... Jes, tiam mi ne trovis kontraŭargumentojn, sed nun mi venigus lin al tiu ĉi virino kaj dirus: jen ŝi estas, vidu, jen estas garantio pri senmorteco de la juda gento! Jes, Ĥackel estas febla, mizera kaj malsanema, jes, lia eterna batalo kontraŭ la vivo metis sur lian vizaĝon kruelajn spurojn de friponado, timideco kaj malfidemo: ja dum miloj da jaroj li "elturniĝis iel-tiel", sufokiĝis en diversaj getoj. Sed la juda virino gardas la spiriton kaj la la filumon de la raso, ŝi zorgeme portas tra rojojn da sango, sub jugo de perforto la sanktan fajron de la genio, kaj ŝi neniam permesos estingi ĝin. Nun mi rigardas ŝin kaj mi sentas, ke malantaŭ ŝi ovriĝas la nigra abismo de jarcentoj. Ĝi estas miraklo, ĝi estas ia dieca mistero. Ho, kion do mi, estinta hieraŭ sovaĝulo, iĝinta hodiaŭ intelektulo, - kiun signifon mi havas en ŝiaj okuloj, kion mi signifas kompare kun tiu ĉi viva mistero, verŝajne, la plej neklarigebla kaj la plej grava en la historio de la homaro?"

***

Malbonan reputacion mi havas. El ĉiuj, al kiuj mi skribis, ke mi rompis la brakon, nur unu interesiĝis, ĉu dekstran aŭ maldekstran? Ĉiuj aliaj demandis – kies?

**Pardonpeto.** En la antaŭa numero de "Israela Esperantisto" estas erare skribita familinomo de s-ro Petro Palivoda. Mi tre bedaŭras...

PRIPENSU…

Foje instruistino eniris en la klasĉambron, kaj anoncis al la  studentoj pri neatendita ekzameno.

Ĉiuj konsterniĝis pro la anonco, atendante la evoluon…

La instruistino disdonis foliojn kun la tasko, sed la teksto, kiel kutime, estis sur la suba flanko.

Kiam ĉiuj folioj estis disdonitaj, ŝi petis la studentojn renversi ilin.

Al ĉies miro tie ne estis tasko – estis nur nigra punkto meze de la folio. Responde al la mirigitaj rigardoj, la instruistino diris:

- Priskribu tion, kion vi ĉi tie vidas.

La  iom konfuzitaj studentoj komencis plenumi la nekompreneblan taskon.

Je la fino de la leciona tempo ŝi kolektis la foliojn kaj komencis laŭtlegi antaŭ la studentoj iliajn verkaĵojn.

Ĉiuj senescepte skribis pri la punkto,  penante klarigi ĝian situon meze de la folio. Kiam la instruistino finis legi la lastan tekston, ŝi komencis rakonti pri la senco de la tasko:

- Mi ne donos al vi la poentojn pro tio. Mi simple volis doni al vi pretekston por la cerbumado. Neniu el vi atentis la blankan fonon de la folio, ĉiuj koncentriĝis al tiu nigra punkto. Same okazas en la vivo. Ni vidas nur la nigraĵon: problemojn, ligitajn kun la sano, mankon de mono, komplikajn interrilatojn en la familio, malreviĝon pri la amikoj… Pripensu, ke eble indas vidi la tutan bildon en kiu ni vivas kaj atenti  ne nur la nigrajn punktojn…

Mi instruis mian hundon boji, kiam ĝi ekvolos manĝi. Okazis longaj trejnadoj! Rezulte, nun ĝi ne manĝas, ĝis mi ne komencos boji…



## LINGVA HELPO

Mi decidis iom helpi al la streboj de Jehoŝua altigi lingvan nivelon de israelaj esperantistoj - li alvokas ĉeestantojn al ĉiulundaj ZOOM-kunsidoj de "Josi Ŝemer"-klubo al la perfektiĝo: *"Mi permesas al mi plue admoni vin partopreni amase miajn lecionojn, ĉar mia pli ol 50-jara sperto en Esperantujo delonge evidentigis, ke via plimulto (eĉ veteranoj) apenaŭ praktikas la lingvon parole, kaj eĉ skribe krude eraras".* Mi plene konsentas kun tiu aserto, kaj kun mia 55-jara E-sperto mi provos iom kontribui 2-foje jare (en la revuo "Israela Esperantisto") al tiu tre utila agado. Tamen mi preferas atentigi la legantojn ne pri iuj vortaj "konfuzaĵoj", sed pri ĉiutaga leksiko. Ni ĉiam devas memori, ke Esperanto, diference de naciaj lingvoj, estas logika(!) lingvo. Do, esperantistoj, parolante (aŭ skribante) en Esperanto, devas pensi en Esperanto kaj ne fari paŭsojn de sia patrolingvo. Ĉar de tio, kiom logike vi parolas, vi estos konvene komprenita.

Mi esperas, ke preskaŭ ĉiuj scias, ke vortordo en Esperanto, diference de multaj aliaj lingvoj, estas libera. Praktike - jes, sed estas minimume du vortoj de kies loko en la frazo dependas la senco. Neniu dubas, ke negativiga vorto "ne" ĉiam devas esti antaŭ la vorto, kiu sence devas esti negativa. Tio estas simple. Sed estas ankoraŭ unu vorto de kies loko en la frazo dependas la senco. Tiu vorto estas "ankaŭ", pri uzo de kiu tre multaj esperantistoj, eĉ spertuloj, eraras, precipe tiuj, kiuj parolante en Esperanto, tamen pensas en sia nacia lingvo. Jen estas praktika ekzemplo: interparolas du homoj, unu el ili diras: "Mi volas manĝi...", kaj la dua havas du variantojn por subteni la interparolon:

1. "Ankaŭ mi volas manĝi" - kio signifas, ne nur la unua homo volas manĝi, sed la dua homo havas la saman deziron;
2. "Mi volas ankaŭ manĝi" - kio signifas, ke tiu dua volas legi libron, viziti naĝbasenon, iri al rendevuo kaj ankaŭ manĝi. Do "manĝi" estas en vico de ties deziroj.

<u>Pri la vorto "dum".</u> Ĝi signifas - en daŭro de io. Se oni skribas/diras: "Li parolis dum kunsido", tio signifas, ke li parolis tutan kunsidon (tio iam okazas). Necesus uzi: "Li parolis en kunsido" (verŝajne ne li sola parolis).

*<u>Principo de sufiĉo kaj neceso</u>*. Eraro: kiam temas pri konata homo, sufikso "-ul-" ne estas bezonata: *konatulo = konato*. Plene sufiĉas....

# Ŝimon Peres – eksprezidento de Israelo, Nobelpremiito



Ni, israelanoj, revis pri propra tero, sed tero, kiun ni ricevis, ne estis nia. Ĝi estis peceto, unu milono de la Proksima Oriento. Ĉi tiu tero ne tre bone rilatis al ni. Tie estis marĉoj, moskitoj, dezerto sude, ŝtonoj. Elekti necesis inter moskitoj kaj ŝtonoj. Tie estis du lagoj – unu morta, la dua estis mortanta. Estis fama rivero – sed akvo en ĝi ne estis. Alivorte - akvo mankis entute. Neniuj naturaj riĉaĵoj – nek oro, nek nafto. Tiam oni diris, ke en la Proksima Oriento estas du tipoj de landoj: naftohavaj, kaj landoj sanktaj. La nia estis tute sankta, ĉar ĝenerale estis nenio. Ni estis solecaj. Ni ne havis fraton laŭ religio, fratinon laŭ lingvo aŭ najbaron laŭ historio. Ĉio ĉi okazis post la Holokaŭsto. Ni venis tien kaj ĝenerale ne sciis, kion fari. Ver-vere ne sciis.

Kaj ni ekpensis: la plej granda riĉaĵo de la naturo estas la homo. La homoj riĉigis la teron. Sed ne tero la homojn.

Ni fariĝis sciencistoj. Ĉiu farmisto en Israelo, ĉiu kibuco komencis pensi, kiel evoluigi agrikulturon sen akvo kaj tero. Kaj ni komencis ĝin evoluigi. Tiu estis la unua en la mondo agrikulturo, fondita dank' al hi-tech. Mi mem tiam estis studento en Agrikultura Universitato, ni penis fari irigadon – akvumis arbojn per varma akvo, ni pensis, ke tiel ili kreskos pli rapide.

Al granda miro, evidentiĝis, ke agrikulturo, kiu baziĝas ne nur surtere, sed dank' al hi-tech, funkcias. Nun ni havas sufiĉe da akvo. Kutime akvon oni serĉas kaj trovas, ĝi ne estas produktata. Kaj ni komencis ĝin produkti. Kaj ni sukcesis. Ni komencis sensaligi la akvon, ni serĉis legomojn, kiuj "trinkas" ne multe da akvo, okupiĝis pri selektado. Do jen estas vera sekreto: por estonto gravas ne tio, kion vi trovas, sed tio, kion vi produktas.

Ni havis nek homojn, nek armilaron, ni neniam militis, ni estis nur 450 miloj da homoj, ne estis generaloj, forestis milita sperto. UNo decidis krei la ŝtaton Israelo, sed fakte estis milito. Kion ni povis fa-

ri? Estas du aferoj. Unue, la homoj devis fariĝi kuraĝaj kaj aŭdacaj, Ili devis kompreni, ke ni ne havas elekton – ni devis nur venki. Se almenaŭ foje ni malvenkos – estos la fino. Due, ĉar ni ne havis armilojn, ni komencis ilin produkti. Por evoluigi armeon, ni estis devigitaj apliki IT (Informacia Teknologio). Israela IT-sektoro laboris por la armeo, ĉar ni estis ĉirkaŭitaj de malamikoj. Kial mi tion rakontas al vi? Ankaŭ nun mi diras al la junularo: geamikoj, vi havas signife pli multe, ol vi opinias. Ne estu mallaboremaj. Vi havas pli multe, ol tero povas proponi al vi. Vi mem povas produkti aĵojn, kiujn vi ne heredis. Tio estas leciono por vi.

Ukrainio estas unu el la plej gravaj landoj en la mondo pri agrikultura mastrumado. Vi vere multe liveras kaj ne devas rezigni de agrikulturado – vi povas kaj devas modernigi ĝin, unuigi la resurcojn kaj talentojn de la popolo. La potenco en tiuj homoj estas tre granda. Sed ili ĉiuj estas iomete pigraj. Se vi volas ion atingi, necesas labori. Nenio falas por ni el ĉielo. Ni en Israelo tre multe laboris. Ĉu tio estas malbone? Mi ne scias... Homoj uzas laborforpermesojn – tio estas vana elspezo de tempo. Mi havas jam 90 jarojn, sed mi neniam forpermesis. Oni diras al mi: “Ĉu vi estas nenormala? Kiumaniere vi ripozas?”. Mi ŝatas labori. Mi pro la laboro ricevas ĝojon. Krome, ne estu pesimistoj – ankaŭ tio estas disipo de tempo, precipe kiam cirkonstancoj ŝanĝiĝas.

Necesas postiri la sciencon. Scienco ne havas limojn, scienco ne havas refleksecon. Ne penu solvi problemojn de la pasinto, mi ne scias, ĉu ĝenerale tio estas ebla. La pasinto ĝenerale ne havas iun rolon, simple studu ĝin por ne ripeti malnovajn erarojn. En pasinto estas nek futuro, nek espero. Plimulto de homoj volas memori, sed ne imagi – tio estas la plej granda eraro. Kion vi volas memori? Ĉu ĉiujn faritajn erarojn? Al historio ne necesas fidi. Historiistoj estis servutoj de reĝoj kaj de tiuj, kiuj momente estis potenculoj – ili diris tion, kio estis momente bezonata.

Homoj timas ion... Nur Dio scias, kio okazos al ni. Oni min iam demandas: se retrorigardi, kiuj estis viaj plej gravaj eraroj? Mi respondas: ni pensis, ke ni havas troajn revojn. Kaj nun ni komprenas, ke ili estis ne troaj. Revu pri io pli granda. Ju pli grandaj estas la revoj, des pli multe vi akiros. Via juna generacio estas belega. Sed kio min incitas en ili – ili malestimas politikistojn.


Ili diras: politiko estas korumpita, ĝi ne plaĉas al ni. Mi respondas: vi estas honestaj, vi volas honestan politikon – do iru, kaj faru honestan politikon. Ĉi tiujn lecionojn mi prenis de la pasinto.
Min oni ankoraŭ demandas, kiel resti aktiva? Tio estas tre simple. Konsideru viajn atingojn kaj revojn. Se viaj revoj plimultas ol la atingoj, tio signifas, ke vi daŭre restas junaj. Se estas male – vi estas jam maljunaj.

## KVIN JUDAJ SAĜULOJ

La unua saĝa judo diris, ke la homoj malbone fartas, ĉar ĉi tie (montrinte al la frunto), ĉio estas malbone. Tiu estis Moseo.

La dua saĝa judo diris, ke la homoj malbone fartas, ĉar ĉi tie (montrinte al la brusto), ĉio estas malbone. Tiu estis Jesuo.

La tria saĝa judo diris, ke la homoj malbone fartas, ĉar ĉi tie (montrinte al la poŝo), ĉio estas malbone. Tiu estis Marks.



La kvara saĝa judo diris, ke la homoj malbone fartas, ĉar ĉi tie (montrinte al la subventro), ĉio estas malbone. Tiu estis Freud.

Kaj la kvina saĝa judo diris, ke la homoj fakte ne tre malbone fartas, ĉar ĉio estas relativa. Tiu estis Einŝtein.

## IOM DA HUMURO POR BONA HUMORO

Morgaŭ hodiaŭ fariĝos hieraŭ...

***

- Moĉjo, pri kio ni ĵus parolis? Mi vizitis necesejon kaj perdis la ideon.
- David,  mi timas eĉ supozi, en kiu loko ĝi estis...

***

Virinoj enamiĝas al tio, kion ili aŭdas, kaj viroj - kion ili vidas.
Tial virinoj ŝminkas la vizaĝon, kaj viroj - mensogas...

***

Se de la unua fojo vi ne sukcesis, paraŝuta sporto estas ne por vi...




## TRO MODERNA FABELO

*(El la libro de Clifford Simak "Rezervejo de goblenoj")*

- En la anonco estas skribite, ke ĉi tie eblas preni "tasko-kvizon", - diris Duonelfo al la urbestro. - Sed forestas la klarigoj, pri kio ĝuste temas. Ĉu vi povas rakonti?
- Ĉio estas tre simpla, - ŝultrolevis la urbestro. - Ĉu vi vidas tiun monteton? Sur ĝi embuskas gobleno kun grenad-ĵetilo. Ĝi regule pafas al la urbo. Ĝuste tio estas la problemo.
- Jes, kompreneble. Necesas mortigi la goblenon.
- Ho ne! - la urbestro elorbitigis la okulojn kaj svingis per la brakoj. - Nenielokaze necesas ĝin mortigi!
- Kial? - miris Gnomo. - Ĝi ja estas gobleno!
- Ĝuste pro tio! Se ĝin ni mortigus, la monda socio diros, ke tio estas genocido kaj ni estos konsiderataj kiel rasistoj.
- Nu, do kio? Oni diru ĉion, kion oni volas.
- ... kaj oni venigos armeon, - morne finis la frazon la urbestro.
- Hm... - enpensiĝis Duonelfo. - El tio sekvas, ke tiu merdulo pafas kontraŭ vi el grenad-ĵetilo, sed vi toleras kaj ne rajtas rezisti?
- Ne rajtas, - mangestis la urbestro. - Ĉi-kaze oni nomos nin agresuloj.
- Nu bone, kaj se ni, konsideru tion ebla, ni ne mortigu tiun goblinon, sed forpelu ĝin ien malproksimen?
- Ĉu de ĝia monteto? Ne eblas - ni tiukaze estos nomitaj okupantoj.
- Kaj se kapti ĝin kaj forpreni ĝian grenad-ĵetilon?
- ... ekspropriuloj.
- Ŝlosi ĝin ie kune kun la grenad-ĵetilo, ĉu? Bone-bone, ne respondu, - rapide diris Duonelfo, kiam la urbestro estis malfermanta la buŝon.


- Mi komprenis. Jes, vere, interesa estas la kazo!
- Kion do vi volas ke ni faru? - intervenis Princino. - Mortigi malpermesitas, malarmigi malpermesitas. Kapti kaj forpeli ankaŭ malpermesitas, kio do restas? Ĉu reeduki? Pri tio ni ne okupiĝas.
- Ne, ne... Por tiu laboro ni invitus psikologon. Sed, tiukaze la monda opinio akuzus nin, ke ni aplikas psikologian premon.
- ... ankaŭ pri profanado de aŭtentaj tradicioj, - aldonis Gnomo, grave svinginte la kapon. - Pafi per grenad-ĵetilo kontraŭ homuloj - tio por goblenoj estas ja sankta afero...
- Jes, jes, - ekĝojis la urbestro, - vi min komprenas.
- Kion, tamen, ni por vi faru? - denove intervenis Princino.
- Porti tien la sakon, - elspiris la urbestro.
- Por kiu? Ĉu por la gobleno?
- Nu jes. Ja tie sur la monteto forestas manĝprovizo. Post horo la gobleno ekmalsatos, anoncos paciĝon kaj iniciatos la pactraktadon. Tiel li ja ĉiutage faras. Li postulas, ke estu alportitaj manĝaĵoj, vino, armilaĵoj, foje ankoraŭ ion... Kaj poste, kiam li satiĝos, li proklamas, ke la pactradtado venis al senelira situacio kaj li estas devigita denove pafadi. La monda socio tre simpatias al ĝi kaj konsideras ĝin principeca.
- Nu, bone, - konkludis Duonelfo. - Se flankigi ajnan politikan ŝelaĵon, ni devas preni tiun sakon de la mendinto kaj alporti ĝin al la kliento, ĉu? Simpla poŝta kvesto. Ĉio resta estas nur viaj problemoj. Ĉu tiel?
- Ĝuste tiel, - konfirmis la urbestro, - do, ĉu ni interkonsentis?
- Jes, ni interkonsentis, - kapjesis Duonelfo.
La urbestro plezurkontente elspiris.
- Ĉu eblas demandi? - levis la manon Princino. - Jen, vi timas, ke la monda socio nomos vin agresuloj aŭ militiniciantoj, aŭ per iu simila pli malbona nocio - kiel ĝi vin konsideras nun?
- Idiotoj, - triste respondis la urbestro... 1968 j.

*P.S. La teksto estas dediĉita al tiuj pacigistoj, por kiuj ĉiam ĉio estas "ne tiel unusignifa".* *Traduko de M.Lineckij*

## PATRA SAĜECO

Junulo, antaŭ la nupto, diras al la patro:
- Paĉjo, mi havas multegon da aferoj kaj pro tio mi estas devigita urĝe forveturi en alian urbon. Jen, prenu mian telefonon kaj bonvolu telefoni al ĉiuj miaj amikoj, kies telefonnumeroj estas tie – ĉirkaŭ 200 homoj kaj invitu ilin de mia nomo al la festeno. Mi nun tute ne havas tempon por fari tion. Ĉu bone?
- Jes, bone, - respondis la patro.
La patro telefonis al ĉiuj, kaj diris, ke la filo havas gravan problemon, li bezonas helpon kaj li atendas ĉiujn en sia eksterurba vilao en certa tago kaj tempo.
La filo revenas, rapidas al la nuptofesto en sian vilaon. Venas tien, kaj kion li vidas – kolektiĝis nur 15 homoj.
La filo diras:
- Paĉjo, mi ja petis vin inviti ĉiujn miajn amikoj!
La patro respondis:
- Filĉjo mia, kredu al mi, al via patro, kiu travivis jam multajn jarojn — ĉiuj viaj veraj amikoj estas ĉi tie... La aliajn vi simple ne bezonas!

Antaŭe la mondon regis saĝuloj. Tio estis kruele. La saĝuloj devigis la stultulojn lerni. Nun la mondon regas stultuloj. Tio estas juste, ĉar ili signife plimultas. Nun la saĝuloj lernas paroli tiel, por ke la stultuloj komprenu. Se la stultulo ion ne komprenis, tio estas problemo por la saĝuloj. Antaŭe suferis la stultuloj. Nun suferas la saĝuloj. Do, nun la suferoj reduktiĝas, ĉar la saĝuloj malplias, malplias kaj malplias...



Mikaelo Ĵvaneckij



**JUDA PROZO DE VIVO**

Se vi estas ne prava kaj silentas - vi estas saĝa.
Sed, se vi estas prava kaj silentas - vi estas edziĝinta...

## NI PROVU IOM CERBUMI, ĈU?

La plej kurta testo pri IQ. Estas nur tri demandoj, sed kiaj…
Ni rigardu, kiel nia cerbo funkcias. Bonvolu ne kapti tuj lupeon por rigardi la solvojn, kiuj estas sube, pripensu bone,
ne kapitulacu tro rapide!
Koncentriĝu bone, nun al vi estos proponita la plej kurta kvizo por ekzameni vian intelekt-nivelon.
Ĝi en la angla nomiĝas Cognitive Reflection Test (CRT), alivorte kontrolo de la kognitiva refleksio.
Ĝin elpensis profesoro de Jela Universitato Sean Frederick, por pritaksi kiel homo povas percepti ion komplikan, kio ŝajnas simpla.
Do, ĉu ni komencu?

Demando № 1.
Basebala bastono kun la pilko kostas $1 kaj 10 cendoj. La bastono estas plikosta ol la pilko je $1. Kiom kostas la pilko?

Demando № 2.
Kvin aparatoj dum 5 minutoj produktas kvin aĵojn. Kiom da tempo bezonatas por ke cent aparatoj por produkti cent aĵojn?

Demando №3.
Surfaco de stavo kovriĝas per nimfeoj. Ĉiutage kvanto da floroj duobliĝas. Plene surfaco de la stavo kovriĝos dum 48 tagoj. Dum kiom da tagoj la floroj kovros duonon de la stavo?

Ĉi tiu testo estis proponita al 3428 simplaj homoj.
33%  sukcesis solvi eĉ ne unu el la taskoj.
83% ne sukcesis solvi unu el la taskoj.
Kaj nur 48% de la studentoj sukcesis solvi ĉiujn tri taskojn.

NE RAPIDU, PENSU ANKORAŬ, ALMENAŬ IOMETE!!!

Jen estas la respondoj:

Respondo № 1.
Kiu estas via unua respondo? Ĉu 10 cendojn? Samen respondas ĉiuj rapiduloj, kiuj konsideras sin tro saĝaj por tiu simpla tasko. Se vere, la pilko kostus 10 cendojn,
la bastono do kostus 10 cendoj + $ 1 = $ 1.10, ĉu ne? Sed tiun monon kostas la kompleto… Fakte kosto de la pilko estas 5 cendoj!

Respondo № 2.
Verŝajne vi tuj haste dirus 100, ĉu? Vane, la demando ne estis simpla. Efektive, 100 ilmaŝinoj por produkti 100 aĵoj bezonas la saman tempon, kiel 5 ilmaŝinoj produktu 5 aĵojn – alivorte 100 ilmaŝinoj  por 100 aĵoj bezonas 5 minutojn.

Respondo № 3.
Kiom da homoj estis, kiuj tuj respondis 24 tagojn – nekalkulebla kvanto. Ĉu ankaŭ vi respondis same? – Ĉi tiu demando estas la pinta!
Ni rezonu logike. Se ĉiutage la floroj duobliĝas, do duonon de la stavo ili kovros unu tagon antaŭ 48-a periodo, bezonata por  plena kovro de la stavo, sekve por kovri la duonon la floroj bezonas 47 tagojn… Logike, ĉu?

## KIU ESTAS LA PLEJ GRAVA VIVPRINCIPO? ESTU ĈIAM BONHUMORAJ!

### IOM PRI AVINOJ...

Strangaj estaĵoj estas la avinoj! Ŝi venis kun lambastono, foriris sen ĝi. Preskaŭ kurante revenis, prenis la bastonon kaj malrapide, lamante foriris...

***

Nepo demandas la avinon:
- Post 56 jaroj da kunvivado vi daŭre nomas la avon karulo, amata, trezoro mia. Kial, se tio ne estas la sekreto?
Avinjo: - Nur sekrete, nur inter ni! Mi forgesis lian nomon antaŭ sep jaroj kaj ĝenas demandi lin...

***

Mia avinjo estas tre gaja. Foje ŝi venis mian ĉambron kaj ekdancis, aŭskultante mian muzikon. Poste ŝi diris:
- Kiel vi povas tiun aĉaĵon aŭskulti? - kaj foriris.

***

Pranepoj de 120-jara avinjo, perdinte la esperon, aĉetis por si loĝejon.

***

Sidas sur parka benko du avinoj. Unu demandas la alian:
- Ĉu vi scias mian nomon?
La dua longe pensas kaj poste demandas:
- Ĉu vi tion urĝe bezonas?

***

Aĉetis avino papagon, kaj diras al ĝi:
- Nu, stultuleto, ĉu paroli vi scipovas?
La respondo estis frapa:
- Jes, mi scipovas paroli, kaj vi, ĉu vi scipovas flugi?



***

Kiel diris saĝa avinjo Klara: “Viro devas konstante diri al virino nur tiujn tri frazojn: jes, mi amas; jes, mi aĉetos; jes, ni veturos...”

***

La avino nenion kaj neniam rakontis pri siaj junaĝaj jaroj, ne pro la sklerozo, sed pro tio, ke ne decas rakonti tion al la genepoj...